

Tagiĝo 7

Junularo agu!



*Centra cirkulero de Esperanto-Junularo
en Ĉeĥoslovakio. Eldonas Junularo en Opava*

Karaj gesamideanoj!

Hodiaŭ Vi ricevas la unuan numeron de nova centra cirkulero, kiu anstataŭas cirkuleron "Junularo agu". Ĉar la situacio kaj kondiĉoj por eldono en Gottwaldov plimalbonigis kaj neniu grupo povas plu eldonadi la bultenon, estis decidite okaze de tutŝtata konferenco de delegitoj en Ostrava, ke Junularo en Opava, kie estas ankoraŭ sufiĉa favoraj kondiĉoj aldonos la organon de Junulara movado en nia ŝtato.

La ĉefa titolo de nia cirkularo estos ne la tradicia "Junularo agu", sed Tagiĝo el tiu simpla motivo, ke ni volas, ke la cirkulero fariĝu ne nur firma ligilo inter Junularaj grupoj, sed ankaŭ la rimedo por kunlaboro de ĉiuj Esperantistoj en nia respubliko.

Nia redakcio atendas la kunlaboron de Vi ĉiuj, ni atendas Viajn artikolojn kaj rimarkojn. La nuna situacio postulas, ke ĉiu el ni fariĝu konscia batalanto por nia granda kaj nobla celo, ke perdiĝu nek unu el niaj kunbatalantoj kaj al tiu celo helpu nia modesta cirkulero.

Nia redakcio esperas venki ĉiuj malfacilaĵojn, precipe la mankon de papero kaj malhelpojn ligitajn kun cililostilado.

Ni petas la regionajn delegitojn kaj ĉiujn esperantistojn, por ke li sendadu al ni raportojn pri movado en sia loko, sed precipe siajn spertojn rilate al propagando de nia lingvo, gvidado de kursoj kaj kunvenoj, skribu pri la kaŭzoj de disfalo de Esperanta grupo, ĉar tio helpas al aliaj grupoj eviti tiun eraran vojon kaj tiel Vi servus al kresko de nia movado.

Nia Tagiĝo bedaŭrinde enhavos nur organizajn rimarkojn kaj raportojn, ĉar la manko de papero ne permesas enmeti amuzajn artikolojn.

Manko de amuza legaĵo kaj gazetoj entute estas tre bedaŭrinda. Sed ekzistas iu havebla bulteno – ĝi estas "El Popola Ĉinio", kiun ni rekomendas al vi, ĉar per abono de ĝi vi ne nur pliboniĝos en la lingvo, sed ankaŭ subtenos Esperanto- movadon en nova Ĉinio.

Ni tre ĝojas je via kunlaboro kaj esperas, ke per nova vojo, difinita de lasta konferenco, kiun vi trovos sur dua paĝo ni akiros ankoraŭ pli grandajn sukcesojn.

Via redakcio.

Nia plua laboro.

Pri kunveno de delegitoj en Ostrava la 27-an de oktobro 1952.

Tradicia "Interbabilado" aranĝata de Junularo Ostrava ne sstas ia granda entrepreno, sed agrabla renkontiĝo de junaj gesamideanoj, kies ridetantaj vizaĝoj kaj optimismo scipovas amuzi sin kaj ankaŭ serioze trakti pri gravaj aferoj de la movado. Ĉi-jare la cirkonstancoj estis favoraj kaj ni povis kune esti de sabato ĝis lundo kaj ĉeesti riĉan programon, kiun preparis Junularo Ostrava. Dimanĉe ni ankaŭ ĉeestis la eksterordinaran kunvenon de delegitoj, kiu estis tre necesa, ĉar sistemo de nia kunlaboro estis en danĝero pro likvido de multaj cirkuleroj.

La kunveno komenciĝis je la 9-a horo. Ĉeestis 50 delegitoj kaj gastoj. S-ano Milan Neuwitrh bonvenigis ĉeestantojn kaj poste s-ano Werner prenis gvidadon de la kunveno. Kunvena programo konsistis el enhavoriĉaj vortoj kaj bona pripensitaj proponoj de ĉiu partopreninto. Post kelkaj vortoj de s-ano Werner ekparolis redaktoroj de cirkuleroj.

Junularo agu! - s-ano Nĕmec; post ferio aperis lasta n-ro, ĉar mankas daŭrigantoj de la eldonado. S-ano Nĕmec foriris studi kaj povas helpi nur iom.

Tagiĝo - s-no V. Novobilský: Ni havas intereson kaj eĉ eblecon eldonadi la cirkuleron. Mankas sole la papero.

Juna voĉo - en Poprad ne estas eble plu eldonadi cirkuleron.

Esperanto-Junularo - laŭ A. Svaĉina: malpermeso de eldenado.

Esperanta vorto - a-ano Werner: Kondiĉoj de eldonado estas pli malfacilaj, sed eblas eldonadi etan cirkuleron unufoje dum monatoj.

Propono de s-ano Nĕmec: Solan centran cirkuleron eldonadu Junularo Opava, kiu povas daŭrigi, kaj ceteraj helpos, kunmetados materialon. Cirkuleron dissendadi al grupo laŭ nombroj/. Individuaj abonantoj penu sendi al cirkulero 100-200 ciklostilpaperojn.

Ĉiuj delegitoj decidis, ke TAGIĜO fariĝu centra cirkulero. S-ano V. Novobilský akceptis funkcion de ĝia redaktoro.

Divido je regionoj laŭ estintaj cirkuleroj kaj elekto de reg. delegitoj.

- | | | |
|----|--|----------------------------------|
| 1. | Praha
Karlovy Vary
Ústí n/Labem | delegito:
<u>Jiří Pastor,</u> |
| 2. | České Budějovice
Plzeň | <u>Vladimír Novotný,</u> |
| 3. | Hradec Králové
Liberec
Pardubice | <u>Karel Franc,</u> |
| 4. | Brno
Gottwaldov
Jihlava | <u>Drah. Chlubnová,</u> |
| 5. | Olomouc
Ostrava | <u>Vl. Novobilský,</u> |
| 6. | Banská Bystrica
Bratislava
Košice
Nitra
Prešov
Košice | <u>Milan Neubeler,</u> |

Ĉiuj lokaj delegitoj raportos pri agado de la grupo, planoj, metodo de laboro ktp. nepre ĝis la 7-a de ĉiu monato al sia reg. delegito!

Regionaj delegitoj el raportoj elektos kaj sendos gravajn kaj utilajn sciigojn al s-ano Novobilský en Opava. Krome reg. del. interrilatos kun ĉiuj grupoj en regiono kaj donos al ili konsilojn kaj helpojn.

Aŭdinte sciigojn de delegitoj, kiuj parolis pri situacio en siaj grupoj, s-ano Werner menciis kelkajn rimarkojn pri labormaniero, utila por ĉiu unuopa grupo:

Se foriras gvidanto de iu grupo (studi, militservi...) restantaj s-anoj devas labori plu! Rondeto neniam memvole disiru! Por ke ne okazu tio, eduku korpuson da fervoraj ges-anoj, bonaj organizantoj propagandistoj - grupajn funkciulojn! Grupo neniam falu pro manko de gvidantoj. Eduku tiel jam junajn kapablajn gelernantojn!

Esperantistaj organizaĵoj aŭ grupoj estas por la movado multe pli utilaj ol izoluloj. Tial laboru en rondetoj, nome en rondetoj amasorganizaĵoj!

Por junulara rondeto ne taŭgas ĉiu ejo por kunvenoj, ekzemple gastejo! Estante rondeto de amasorganizaĵo, klopu ricevi pli konvenan kunvenejon.

Kompreneble en tiu formo de ekzisto ne forgesu plenumi deziron de supera estraro, laboru kiel progresemaĵo ĉeĥoslovakaj esperantistoj!

La kunveno en Ostrava ne volis ŝanĝi la laborplanon esprimitan en rezolucio de somera konferenco en Rožnov, sed nu korekti punktojn 3 kaj 6, kies temo estas la cirkuleroj, kaj pli klare kaj konkrete montri nian vojon. Do en plua laboro ne forgesu:

1. Daŭre pliprofundigadi sciojn lingvaj kaj funde ellerni la lingvon.
2. Plibonigi la rilaton al la pli aĝaj gesamideanoj kaj forigi la izolemon.
3. Plifirmigi la kunlaboron kun regionaj delegitoj.
4. Kiom eble plej multe interrilati kun ceteraj grupoj en la regiono.
5. Partopreni labore en la amasorganizaĵoj.
6. Subteni nian centra cirkuleron Tagiĝo.

Liberaj proponoj

S-ano Werner: Kunmeti kartotekon kaj adresaron de ĉiuj Esperanto-Rondetoj kaj viglaj esperantistoj. Post diskutado estis akceptita korektita propono de L. Kyselý: Ĉiu delegito konstatos kiam kaj kie kunvenas ĉiuj Esperanto-Rondetoj en la loko kaj adresojn de individuaj esperantistoj. Rezulton sendu al: Ladislav Kyselý, Provaznická 10, Ostrava VI.

Dr. Mohapl povas sendi liston de regionoj Olomouc, Gottwaldov, Brno.

Estis akceptita propono, ke ĉiu Esperanta entrepreno de pli grava signifo devas esti antaŭ ĉio sciigita al s-ano Fr. Svačina – Lanžhot, kiu respondos, ĉu proponita dato estas libera. Celo: Du gravaj Esperantaj entreprenoj ne okazu samtempe!

S-ano Paruza rimarkas, ke ni ne forgesu pruvi, ke esperantistoj batalas por la paco!

S-ano Neuwirth riproĉas, ke esperantistoj mem malmulte vizitadas siajn entreprenojn, ekzemple Somerajn Esperanto-kolegiojn.

Dro Mohapl konsilas, ke bone preparita publika diskuto estas bonega propagando por nia movado.

Kunveno estis finita je la 12-a horo 15 minutoj per kanto "Esperanta Junularo".

Mi postulas vin, ke vi efektive plenumu la planon, por ke ni mano en mano venku ĉiujn ĝenojn kaj malhelpojn, por ke ni post unu jaro estu ankoraŭ pli proksime al la celo. Por laboro en venonta tempo mi deziras al vi kiel plej fervorajn kondiĉojn kaj ĝojan vivon en vigla kolektivo de Esperanto-Junularo.

Jan Werner

Laŭ protokolo de V. Sukačová

Kaj nun kelkaj raportoj:

Junularo Ostrava:

ni kunvenadas regule ĉiuvendre je la 18-a horo 30 min. en Lidový dům, Slezská Ostrava - Kamenec.

La 18-an kaj 19-an de oktobro ni komune vizitis amuzvesperon kaj regionan kunvenon en Třinec.

Dum la 26-a kaj 27-a de oktobro ni aranĝis "Junularan interbabiladon". Partoprenis ĉirkaŭ 30 gastoj el diversaj urboj.

Ni supozis, ke alveturos pli multe da samideanoj, preĉipe delegitoj, ĉar dum kunveno estis pritraktitaj gravaj punktoj rilate de nia organizo.

Okaze de amuzvespereto de minejo Petr Bezruč ni aranĝis malgrandan propagandan anguleton.

La 7-an de novembro ni malfermos kurson por kpmencantoj kaj konversacian kurson. Por ĉiu kunveno ni preporis interesan prelegon.

SK.

Junularo Olomouc

Junularo Olomouc kunvenadas regule ĉiujŝaŭde de 18-a ĝis 19-a horo en klubejo. Kurso por komencantoj havos krom ceteraj ankaŭ ankaŭ 25 knabojn kaj knabinojn, kiujn ni volas altiri al organiza laboro. Anstataŭ Karel Fabián, kiu estis delegito de Junulara grupo, sed kiu nune militservas, prenis la taskon de delegito Miloš Rudolf, Olomouc, Wanklova 14.

La 26-an de oktobro partoprenis kelkaj s-anoj la laborkunvenon en Přerov. Prezidanto de nia grupo Dro Mohapl partoprenis ankaŭ la konferencon de delegitoj en Ostrava.

Miloš Rudolf.

Junularo Opava:

Kunvenoj de Junularo okazas merkrede je la 18-a horo en Kultura domo. Estis aranĝitaj du kursoj kaj ambaŭ estas gvidataj laŭ Ĉe-metodo kun tre bona rezulto. Ĝoje estis atendita la filmo, farita de nia fotografisto dum nia Somera Lernejo. Ĝi estas parte eĉ kolora kaj revivigis niajn rememorojn pri la belaj tagoj travivitaj en amika rondo. La filmo estis ankaŭ prezentitaokaze de "Interbabilado" en Ostrava, kaj nun estas en Praha.

Redakcio de nia cirkulero ankaŭ transprenis la eldonadon de nia centra cirkulero por ĉiuj Junularoj.

La 30-an de novembro okazos en Opava regiona kunveno, kie nia Junularo intencas prepari kulturan enmetaĵojn. Ankaŭ la 30-on estos la malfermo de ekspozicio Esperanta, prunteprenita de s-ano Burda. Dimanĉe la 16-an vizitis nin s-ano Sádł el Junularo Praha, kun kiu ni priparolis kelkajn gravajn problemojn.

Decembre ni aranĝos Zamenhof-vesperon.

V.N.